Kvankam intertempe en la firmao nenio plu estas brita, ĝi estas kaj restas la plej grandkomercista aŭtomobilproduktejo en Britujo de ĉiuj tempoj. (2009-11-30)

## Kaŝmira lano

La kaŝmirlanon produktas la kaŝmirkapro, kiu disvastiĝas de Tibeto ĝis la altebenaĵoj de la Gobi-dezerto. El la nomdona iama princlando ĉe la piedo de Himalajo venas nur malgranda kvanto de la tutmonda produktado. En Ĉinujo, Mongolio kaj Tibeto la kaproj bezonas sian felon kiel malvarm-protektilon. Tie oni elkombas la lanugharojn dum la natura harar-ŝanĝo en la printempo.

En Afganujo, Novzelando kaj Irano la kaproj estas tondataj: kaj nur poste oni dispartigas la malfajnajn supraĵ-harojn de la dezirata fajna lanugo. Tiu proceduro ne rezultigas multon kaj plialtigas la prezon de la varo. Por lanugmola kaŝmirpulovro la kapro devas kvar fojojn perdi siajn harojn. (2009-11-25)

## Silabointerŝanĝantoj

– kompare kun *Chintang* la germana estas facila lingvo…

Por multaj homoj la germana estas tre malfacila lingvo. Pri tio nur ridetas la parolantoj de "ĉintango", kiun lingvon parolas proksimume 6500 homoj – kvankam la politikaj statistikoj (laŭ "oficialaj donitaĵoj") listigas nur 8 ĉintang-parolantojn. Por lingvistoj tiu lingvo estas enigma – sed ankaŭ inspira: laŭ esploroj, subtenitaj de Fondaĵo de *VW* (temas pri la germana *Volkswagen*-aŭtomobilfabriko), lingvo-esploristoj el Lejpcigo (*Leipzig* / Germanio) estas alfrontitaj de specialaĵoj, kiuj ne estas konataj ĉe iu alia lingvo en la tuta mondo.

La solece disigita monto-popolo en Nepalo, ĉepiede de la fama Monto Everesto, tute laŭvole interŝanĝas silabojn kaj vortopartojn ene de vorto. Tiel eblas, laŭ docento *Balthasar Bickell*, diri laŭ propra elekto "vi pridemandis, vi demandopriis, vi manpridedis". Ĝis nun psiĥologoj kaj lingvistoj pensis, ke tiom da lingva fleksebleco estas tro por la homa cerbo, kaj sekve neebla. Jam la abundo de diverseco kaj varieco estas neelĉerpebla. Okaze de verboj ekzistas ĝis mil varioj, kiuj limigas ĉion en ĉiu ajn esprimdirekto.

Ĉe ĉiu verb-formo estas deviga la konsidero de persono, nombro, substantivo, objekto – krome diversa ankaŭ laŭ ĝentilmanieraj formoj. Ekzistas tri nombroindikoj: unupersona, dupersona, multpersona. Aldoniĝas sekreta "laŭ-rita" lingvaĵo (ekz. dum rikolt-ofero) kiun konas nur kelkaj inicitoj. Kunligita estas la lingvoarto kun viva rakont-tradicio pri mitoj kaj rakontoj, por kiuj ne troviĝas paraleloj en aliaj kulturgrupoj, ekz. por domkonstruado kaj bierfarado.

La esplorado de ĉintango donas motivon por samtempe du sekvaj esploroj. Kognosciencistoj (kiuj prilaboras la homan percept-kapablon) provas eltrovi, kiel oni povas percepti kaj redone interpreti tiom grandan lingvaĵ-variecon. Psiĥolingvistoj ĉe la *Max-Planck*-Instituto por Evolua Antropologio en Lejpcigo (ankaŭ subtenata de VW-fondaĵo) esploras, kiel infanoj en Ĉintangujo lernas sian lingvon. Ekde kvar jaroj, la lingvisto *Bickel* kaj kunlaborantoj provas surloke dokumenti *Chintang*-on (kaj same ankaŭ la de forpereo endanĝeritan *Puma*-on).

Ambaŭ lingvojn flankenpuŝas kaj subpremas la nacian lingvon *"Nepali"*. La VW-fondaĵo en Hanovro / Germanio jam ekde 1999 helpas per sia subten-iniciato "Dokumentado de endanĝeriĝintaj lingvoj" registri (ankaŭ elektronike) kaj kolektadi ĉiujn informojn ĉe la nederlanda *Max-Planck*-Instituto en *Nijmegen*. La ĉ. 30 lingvoj, kiujn oni kun subteno de la Fondaĵo pristudas, etendiĝas de iu varianto de la *Sioux*-indianoj ĝis lingvoj de aŭstraliaj indiĝenoj aŭ la buŝmena *San*-tribo en Sudafriko. (Fonto: *FAZ.*, 2007-02-16)

## Usonaj ĉevaloj

havas problemon, pri kiu jam en la jaro 2007 alarmsonorigis la veterinaroj: la usonaj ĉevaloj estas tro grasaj! La bestokuracistoj jam delonge havis la impreson, ke tio estas tia. Nun oni faris la provon: de 300 hazarde elektitaj ĉevaloj 51% estis tro dikaj, 20% eĉ adipozaj (ili do havis postaĵojn pri kiuj eĉ pezegaj bierfarejaj ĉevaloj hontus). Dum mondovaste ĉe hundoj kaj katoj plialtiĝas la pezo, tio ĉe la ĉevaloj estas usona specialaĵo. Respondecas laŭdire por la tro-pezo la nutraĵriĉa herbo de la vastegaj paŝtejoj. Tian herbon oni iam antaŭe elsemis por rapide transformi taŭga por buĉado la volumen-ampleksan korpo-dikecon de bovoj. La solvo de la problemo "kuŝas ĉe la selo": en tiun la rajdistoj devus salti pli ofte anstataŭ paŝti la ĉevalojn sur la nutraĵriĉan herbejon malantaŭ la butiko, kie vendiĝas hamburgeroj kaj aliaj sandviĉoj… (2009-12-09)